# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-28 n-ro 430

# Iniciato pri "Olimpika Armistico"



Guterres alvokas malhelpon al disetendiĝo de malamo

Israelo: La plej malnovaj restaĵoj de Homo sapiens, ekster Afriko, malkovritaj en la groto Mislija

Socia agado de Bieno Bona Espero omaĝita en la ŝtata parlamento de Goiás

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Iniciato pri "Olimpika Armistico"
*Dum la Vintraj Olimpikoj kaj la Vintraj Paralimpikoj p. 03*

Guterres alvokas malhelpon al disetendiĝo de malamo
*Okaze de la alveno de "Internacia Memortago pri Holokaŭsto" p. 03*

Du siriaj partioj konsentas ĉesigi batalon en *Ghouta*
*Naŭa porpaca intertraktado p. 04*

Nova programeto ebligas al uzantoj diskonigon de lokaj novaĵoj
*Guglo prezentis novan servon pri novaĵoj p. 04*

Israelo: La plej malnovaj restaĵoj de *Homo sapiens*, ekster Afriko, malkovritaj en la groto *Mislija*
*Inter 177 000 kaj 194 000 jaroj p. 05*

La junaĝo hodiaŭ finiĝas nur kun 24 jaroj
*Ŝanĝoj en la vivoplanado p. 06*

Duoblaj akvoturbuladoj en oceanoj
*Mezoskalaj akvoturbuladoj p. 07*

Socia agado de *Bieno Bona Espero* omaĝita en la ŝtata parlamento de *Goiás*
*Ĉirkaŭ 600 malriĉaj infanoj estis edukitaj en tiu institucio p.. 07*

# Iniciato pri "Olimpika Armistico"

La 26-an de januaro Miroslav Lajčák, la prezidanto de la 72-a Ĝenerala Asembleo de UN, deklaris alvokante, ke ĉiuj ŝtatoj-membroj de UN respondu la iniciaton pri "Olimpika Armistico" dum la Vintraj Olimpikoj kaj la Vintraj Paralimpikoj ĉi-jare okazontaj en *Pyeongchang*.



Miroslav Lajčák voĉlegis sian deklaron en tiutaga plena sesio de la Ĝenerala Asembleo. Li diris, ke kiel prezidanto de la 72-a Ĝenerala Asembleo de UN, li solene alvokis, ke ĉiuj ŝtatoj-membroj plenumu sian promeson praktiki "Olimpikan Armisticon" dum la Vintraj Olimpikoj kaj la Vintraj Paralimpikoj ĉi-jare okazontaj en *Pyeongchang*, kaj per konkretaj agoj akcelu pacon kaj harmonion en loko, lando, regiono kaj en la tuta mondo. Kaj samtempe li alvokis, ke ĉiuj partioj engaĝigitaj en armita konflikto rezolute konsentu ĉesigi batalhalton dum la praktikado de "Olimpika Armistico" kaj donu okazon por pace solvi disputojn.

Xiong
Ĉina Radio Internacia

---

# Guterres alvokas malhelpon al disetendiĝo de malamo

La 26an de januaro, okaze de la alveno de "Internacia Memortago pri Holokaŭsto", António Guterres, ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, faris videan paroladon, alvokante, ke la internacia komunumo kune malhelpu la disetendiĝon de malamo.



La 27-a de januaro estas "Internacia Memortago pri Holokaŭsto". Guterres diris, ke Unuiĝintaj Nacioj en tiu tago elvokas la memoron pri la ses milionoj da judoj mortintaj en la masakro. En tiu tempo brutalaĵoj furiozis tra la mondo, ankaŭ aliaj homoj sennombraj perdis sian vivon. Kaj hodiaŭ, kvankam la Dua Mondmilito finiĝis jam antaŭ kelkaj dekjaroj, tamen antisemitismo ankoraŭ regas tie kaj ĉi tie kiel fantomo, kaj diversformaj antaŭjuĝoj ĉiam pli kreskas.

Guterres emfazis, ke ĉiuj popoloj havas respondecon, rapide, racie kaj kategorie rezisti al rasismo kaj perforto, kaj ke la tuta mondo certe povas, per klerigo kaj kredigo, havi la estontecon, en kiu ĉiu havas dignon, ĝuas homajn rajtojn kaj pacan kunekzistadon.

Xiong
Ĉina Radio Internacia

# Du siriaj partioj konsentas ĉesigi batalon en *Ghouta*

La 26-an de januaro la reprezentantoj de la Siria registaro kaj tiuj de la opozicioj en Vieno interkonsentis, ke la du partioj ĉesigos la batalon en la regiono *Ghouta* ĉe la orienta antaŭurbo de Damasko.



Laŭ tiu interkonsento, la diversaj Siriaj partioj implikitaj en la armitaj konfliktoj en la regiono *Ghouta* komplete detenos sin de batalo ekde la nula horo de la 27-a de januaro laŭ la damaska tempo, permesos la fortojn de humanisma helpo eniri en la regionon, kaj intertempe al si interŝanĝi militkaptitojn.


Kio okazis en Vieno estas la naŭa porpaca intertraktado, kiu estas ankaŭ "lasta espero" por Sirio, se ĝi volas pacon.

XIONG
Ĉina Radio Internacia

---

# Nova programeto ebligas al uzantoj diskonigon de lokaj novaĵoj

Ĵaŭde, la 25-an de januaro, la firmao Guglo prezentis novan servon pri novaĵoj, kiu inkluzivas la komunumon. Temas pri la programeto *"Bulletin"*, kies fokuso estas la diskonigado de tute loka novaĵaro, kun ebleco pri kontribuado fare de ajna uzanto.



Komence tiu projekto ekvalidis en la urboj Naŝvilo (Tenesio) kaj *Oakland* (Kalifornio), kaj la interesataj uzantoj nepre aliĝu al ĝi per reta formularo [LIGILO].

La programeto *"Bulletin"* subtenas bildojn, filmetojn kaj tekstojn, kaj la afiŝado de okazintaj kaj okazantaj eventoj oni faras rekte per poŝtelefono.

Guglo ne klarigis, ĉu estos redaktado aŭ moderigado de la enhavoj, cele al evitado de misuzoj kaj falsaĵoj. Jen la oficiala klariga retpaĝo (angle): LIGILO.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



# Israelo: La plej malnovaj restaĵoj de *Homo sapiens*, ekster Afriko, malkovritaj en la groto *Mislija*

Fragmento de makzelo aparteninta al *Homo sapiens* estis malkovrita en israela groto. Temas pri la plej malnovaj restaĵoj hodiaŭ konataj de *Homo sapiens* ekster Afriko. Tiu fragmento de sepdenta makzelo, elfosita en israela kaverno, estas la plej malnovaj restaĵoj konataj pri *Homo sapiens* ekster Afriko. Ĝi montras, ke nia specio migradis ekster tiu kontinento multe pli frue ol ni opinias, laŭ la magazino Scienco [*Science*] publikigita la 26-an de januaro.

Esploristoj anoncis la malkovron de tiu fosilio, aĝa inter 177 000 kaj 194 000 jarojn, kaj deklaris, ke la dentoj surhavas karakterizajn signojn de *Homo sapiens*, kiuj ne ĉeestas en aliaj homedoj, inter kiuj la Neandertala homo.

**La plej malnovaj fosilioj en Afriko datiĝas de antaŭ 300 000 jaroj**

La fosilio de maldekstra supra makzelo de juna plenaĝulo – kies sekso ne estis identigita – estis malkovrita en la groto de *Misilja*, sur la okcidenta flanko de Monto *Karmel*, 12 kilometrojn sude de Ĥajfo [ חֵיפָה Ħêphāh حَيْفَا Ħayfā]. Ankaŭ klingoj kaj aliaj ŝtoninstrumentoj, pluraj fajrejoj kaj karbonigitaj ostaĵoj de bestoj estis trovitaj surloke.

*Homo sapiens* aperis en Afriko, kie la plej malnovaj fosilioj de la specio datiĝas de antaŭ 300 000 jaroj. Ĝis nun, la plej malnovaj fosilioj trovitaj ekster Afriko devenis de du aliaj israelaj kavernoj (el kiuj unu situanta ankaŭ sur Monto *Karmel*), kaj kiuj datiĝas de antaŭ 90 000 ĝis 120 000 jaroj.

Neniam Milito Inter Ni

# La junaĝo hodiaŭ finiĝas nur kun 24 jaroj

Esploristoj markas por la magia limo al la plenkreska aĝo novan aĝon: El 19 fariĝas 24.



Aŭstraliaj sciencistoj ŝancelas kutiman imagon pri la plenkreskeco: Se en antaŭa epoko oni vidis la transiron de juno al plenkreska aĝo ĉe la aĝo de 19 jaroj, nun ekspertoj pledas ŝovi tiun limon malantaŭen - nome al aĝo de 24 jaroj. Tion raportas aŭstraliaj sciencistoj en faka ĵurnalo.

Kiel kaŭzojn la sciencistoj nomas precipe la ŝanĝojn en la vivoplanado: Laŭ ili, junaj homoj hodiaŭ signife pli malfrue geedziĝas ol ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj, ili pli malfrue fondas familion kaj pli malfrue finas sian kleriĝon. "Multaj leĝaj privilegioj komenciĝas en la aĝo de 18 jaroj, sed plenkreskaj rolbildoj kaj konscio pri respondeco manifestiĝas nur kelkajn jarojn poste, skribas la ĉefa aŭtorino el Aŭstralio.

Ni prenu ekzemplojn el Aŭstrio: La averaĝa geedziĝa aĝo en la jaro 2016 en tiu lando situis ĉe 30,3 jaroj. (Komence de la 1990-aj jaroj virinoj edziniĝis en aĝo de averaĝe 24,2 jaroj). Ĉe viroj la averaĝa edziĝa aĝo situas ĉe 32,6 jaroj (en la 1990-aj jaroj ĝi situis ĉe 26,5 jaroj).

Simila evoluo montriĝas ĉe la naskoj: Virinoj decidas havi la unuan infanon pli kaj pli malfrue. Se la averaĝa aĝo de virinoj ĉe la nasko de la unua infano en la jaro 1984 situis ankoraŭ ĉe 24 jaroj, en la jaro 2014 tio estis aĝo de 29 jaroj.

Fakte la ekspertoj jam delonge provas difini la finon de la junaĝo. Leviĝas la demando kiuj faktoroj estu konsiderataj por tio: Ĉu estas decide ke la korpa evoluo atingis finan punkton? Aŭ ĉu oni prefere konsideru kondutmanierojn kiuj aperas en plenkreska aĝo?

Se temas pri la komenco de la junaĝo la ekspertoj apenaŭ havas dubojn: Ekde kiam la korpo de infano produktas sekshormonojn, la pubereco startas. Ĉe knabinoj tio okazas en aĝo de 11 jaroj, ĉe knaboj unu jaron pli poste.

Rilate al plenkreskeco necesas distingi inter korpaj kaj sociaj faktoroj. La korpa plenkreskeco ĉe bone nutritaj junuloj kaj junulinoj certe ne ŝoviĝis supren, sed la junaj homoj hodiaŭ povas pli longe resti en la sino de la familio de la gepatroj. Se mankas la premo havi propran loĝejon, tiam la "hotelo panjo" estas agrabla vivobazo kiun junaj homoj ne ŝatas forlasi rapide. Tiel ili restas pli longe infanoj kaj restas ankoraŭ dum longa tempo dependaj de la gepatroj.

Esperanta Retradio

## Duoblaj akvoturbuladoj en oceanoj

Sciencistoj jam antaŭ kelka tempo konstatis, ke en la maroj kaj oceanoj kreiĝas grandegaj akvoturbuladoj kun la diametro egala eĉ al ĝis kelkcent kilometroj. Temas pri la tiel nomataj mezoskalaj akvoturbuladoj, kiuj peras longdistance grandegajn kvantojn da akvo kaj varmo. Laŭ matematikaj kalkuloj, oni ŝpinis spekulativadojn, ke ili povas aperi pare, sed longe oni parolis pri tio nur teorie.



Nun eblis observi ilin pere de satelitoj, kaj malkovris tion sciencistoj el Liverpulo, rimarkitaj en Tasmana Maro, oriente for de Aŭstralio. Alia ĉi-speca kazo estis notita en la suda Atlantiko ĉe la okcidenta bordo de la Suda Afriko. Laŭ sciencistoj, tiuj akvoformacioj povas tre rapide aliloki je grandaj distancoj malgrandajn marajn animalojn. Estis konfirmite, ke la akvoturbuladoj moviĝas laŭ kotraŭaj direktoj, kvankam ili estas ligitaj. Estis ankaŭ difinite, ke tia para drivado de akvoturbuladoj povas daŭri ĝis 6 monatojn. Se la unuopaj mezoskalaj akvoturbuladoj preskaŭ ĉiam direktiĝas okcidenten, la paraj akvoturbuladoj kapablas moviĝi orienten kun rapideco eĉ 10-obla. Ilia influo je la tera klimato ne estas ankoraŭ difinita, sed kiel asertite, ĝi tutcerte ekzistas, ĉar la moviĝanta varmo influas la atmosferan cirkuladon.

Pola Retradio

---

## Socia agado de *Bieno Bona Espero* omaĝita en la ŝtata parlamento de *Goiás*

La 17-an de oktobro la Parlamento de Ŝtato *Goiás*, en la centrokcidenta regiono de Brazilo, okazigis omaĝon al *Bieno Bona Espero*. La TV-stacio *Supren*, el Braziljo, elsendis specialan raporton pri la evento.



Respondecis pri tiu iniciato la deputito Santana Gomes, eks-lernanto de la esperantista instruejo. Krom laŭdi la laboron entreprenitan en tiu bieno-lernejo, la politikisto substrekis, ke, laŭlonge de pli ol 40 jaroj, ĉirkaŭ 600 malriĉaj infanoj estis edukitaj en tiu institucio, situanta en la urbo *Alto Paraíso*.

Partoprenis la solenaĵon gesinjoroj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, direktoroj de *Bona Espero*. Ambaŭ estis honorigitaj per diplomoj. Plie ŝi ricevis florbukedon. Ankaŭ estis distingita la advokato Ulisses Riedel, prezidanto de la ne-registara organizo *União Planetária* (Unio Planeda), kiu nuntempe administras la bienon.

Esperantistoj, familianoj, eksaj lernantoj kaj membroj de *Rotary Club* plenigis la parlamentejon. Fine de la kunsido, s-ro Grattapaglia kortuŝite esprimis modestecon, dirante, ke li nur plenumis sian devon, pro la mizera situacio, kiun li trovis en tiu regiono.

Esperanto Ilustrita